

Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Septembro 2003

MENSUEL/MONATA

74-a jaro, n-ro 9 (1179)

ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

5 €

<http://www.sat-esperanto.org/> *** retadreso: satesper@noos.fr

76-A KONGRESO DE S.A.T. EN ĈAŬDEFONO



Sub varma suno, antaŭ la kongresejo, kolektiĝis "pacaj batalantoj" por eternigi per oficiala foto la komencon de nia 76-a kongreso.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redakto...

Karaj,
kiel promesite, en tiu ĉi numero vi trovos diversajn informojn pri la 76-a SAT-kongreso. Kompleta, detala protokolo pri niaj laboroj aperos en oktobra Sennaciulo.



Nia aktivulino el Japanio, Viola, donas al ni tre interesajn impresojn pri sia unua SAT-kongreso kun tre utilaj rimarkoj kaj proponoj.

Ankaŭ vi trovos raportojn pri LEA-komitato, kunvenoj de diversaj frakcioj, ktp. kaj eĉ la unuan informon pri la venontjara SAT-kongreso kiu okazos en la ĉefurbo de Slovakio - Bratislava (14-21.08.2004). Jam nun vi povas aliĝi. Do, profitu tuj de la plej malalta kongreskotizo.

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon al SAT por 2003, bonvolu fari tion nun. Ja, ni jam estas en septembro. Dankon.

Via redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redakto: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redakto.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM

Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.


Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

NOVA KASISTO DE LIBERECANA FRAKCIO

Liberecana Frakcio de SAT havas novan kasiston:
SANTIAGO BORDES FERRER
Apartado de correos 159
ES-03720 BENISSA (Alicante)
Banco Santander Central Hispano
0049 3088 01 2194018606



**LA LASTA
ELDONAĴO DE S.A.T.**

*Verko de nia kamarado
Djemil Kessous jam
ekzistanta en la franca
nun estas legebla en
Esperanto.*

Mendu ĝin ĉe SAT.

Prezo 12 € inkl. aŭfrankon.

S.A.T. OFICIALE ALIĜIS AL LA EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)

SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !



Nova PIV aperis !

Akiru ĝin ĉe SAT.

Prezo: 70 € + aŭfranko

Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €

ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

DEFINITIVAJ KONGRESAJ DEKLARACIO KAJ GVIDREZOLUCIO

DEKLARACIO

La 76-a Kongreso de SAT okazanta en La Chaux-de-Fonds (Ĉaŭdefono) de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2003 kun 155 partoprenantoj el 28 landoj:

- * **Kondamnas** la vizoreĝimojn kaj aliajn leĝajn regulojn kiuj atencas la rajton de homoj je libera cirkulado sur la Tero kaj alvokas la koncernajn ŝtatojn ŝanĝi ilin.
- * **Reasertas** la firman opozicion de SAT kontraŭ la imperiisma milito en Irako plenumita de la internacia alianco gvidata de Usono, kaj kontraŭ ĉiuj imperiismaj militoj.
- * **Alvokas** ĉiujn esperantistojn, kiuj povos, partopreni en la venonta Eŭropa Socia Forumo, kontribui al ties politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj celoj kaj malfermi ĉiuf flankan debaton pri lingva politiko.
- * **Subtenas** la sintenon kaj agadon de la Ekologiisma Frakcio de SAT rilate la principojn de mediprotektado anoncitajn en ĝia Deklaracio de 2003-07-14.

GVIDREZOLUCIO

La 76-a Kongreso de SAT okazanta en La Chaux-de-Fonds (Ĉaŭdefono) de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2003:

- * **Deziras** sukcesan agadon al la nova hispanlingva LEA-SATEH;
- * **Instigas** la membrojn partopreni en la agado de la Eŭropa Socia Forumo kaj de la Monda Socia Forumo por helpi al la realigo de iliaj celoj : per tradukado de TTT-paĝoj de SAT kaj de tekstoj de ESF, kiel ankaŭ per informado per niaj TTT-paĝoj kaj en Sennaciulo antaŭ la ESF; per interpretado, helpo ĉe budoj, disdonado de flugfolioj, loĝigado de aliurbanoj, ĉeesto en Forumaj diskutoj, kaj partopreno en eventuala seminario aŭ fakkunveno.
- * **Proponas** ke en Sennaciulo kaj en la venonta SAT-kongreso estiĝu debato pri la lingvopolitiko.
- * **Alvokas** la membraron helpi plibonigi kvante kaj kvalite la nacilingvan informaron en niaj TTT paĝoj, cele al starigo de senperaj rilatoj inter la SAT-medio kaj progresemluloj, kiuj informiĝas pri Esperanto kaj eklernas ĝin.

Persona deklaro de k-do Vilhemo Lutermano:

"Mi notas la progreseman sintenon de la Esperanta Civito pri la Monda Socia Forumo kaj la milito kontraŭ Irako, kaj esprimas mian dankemon al la Kultura Centro de Esperanto (KCE) kiu sukcese organizis nian kongreson, inter kiuj estas pluraj membroj de la Esperanta Civito."